

I^pI

Informilo *por* Interlingvistoj

32-a jaro (kvara serio) ◆ ISSN 1385-2191 ◆ n-ro 125 (2023:4)

Eldonas


Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED)

www.esperantic.org ◆ esfacademic.org ◆ esfconnected.org

interlingvistiko.net ◆ [@esperanticsf](https://www.instagram.com/esperanticsf) ◆ [@esfacademic](https://www.instagram.com/esfacademic)

www.facebook.com/esperantic

Redaktas

Başak ARAY  ◆ KIMURA Gorō Christoph (木村 護郎クリストフ) 

Jorge Antonio LEONI DE LEÓN  ◆ Bengt-Arne WICKSTRÖM 

Por kontakti la redakcion: IpI@interlingvistiko.net

ENHAVO

I	Eventoj	4
1	Internacia seminario en Sevilla	4
1.1	Organizantoj	4
1.1.1	Loko	4
1.2	Temo	4
1.3	Priskribo	4
1.4	Programo	4
2	International congress of linguists 2024	6
2.1	Organizanto	6
2.2	Tempo	6
2.3	Priskribo	6

3	Prezentado de la libro «Epistemological and theoretical foundations in language policy and planning»	7
3.1	Tempo	7
3.2	Loko	7
3.3	Priskribo	7
4	Unua studkunveno pri «setuei» (ŝparema uzo de la angla lingvo)	7
4.1	Priskribo	7
5	Studraporta kunsido de Japana Esperanto-Instituto	8
5.1	Organizantoj	8
5.2	Loko	8
5.3	Tempo	8
5.4	Programo (en la japana)	8
5.5	Fonto	8
II	Universitata kaj esplora agado	9
1	Conference: Mapping multilingual (counter-)expertises: Scientific and political knowledge production across borders in the long twentieth century	9
2	Kurso en Universitato de Seviljo	9
III	Kulturo	11
1	Lingvolernado ŝrumpas en Usono	11
2	Invito al terminara revizio	11
3	Artikolo kaj prelego pri la bicikla vojaĝo de Lucien Péraire	12
4	Sgrafitoj	12
IV	Personoj	13
V	Bibliografiaĵoj	13
1	Tezoj, disertacioj, diplomlaboraĵoj	13
2	Libroj	14
3	Libroĉapitroj	20

4 Novaĵletoj	20
4.1 Global coalition for language rights (GCLR)	20

I EVENTOJ

1 INTERNACIA SEMINARIO EN SEVILLA

1.1 *Organizantoj*

Cienciencia. Esperanta entrepreno por la demokratiigo de la scienco

Hispania Esperanto-Federacio

Sevila Esperanto-Asocio

<https://kongreso.civiencia.io/SR2023/eo/>

1.1.1 Loko

Aula de grados

Facultad de Filología

Universidad de Sevilla

Calle Fernando s/h

1.2 *Temo*

Sociaj retoj kaj homa konduto

1.3 *Priskribo*

La seminario estas universitata antaŭkongreso de la 81-a Hispana Esperanto-Kongreso kaj okazos la 10-an kaj 11-an de oktobro en la Fakultato pri Filologio kaj pri Psikologio de Seviljo. Ĉiuj kiuj registritaj aliĝis al la oficiala kongreso estas invititaj partopreni. Ĝi pritraktas la deziron al interkompreniĝo inter popoloj, lingvan kaj sociologian analizon de Esperanto, sociajn retojn, inter multaj aliaj temoj. La antaŭkongreso enhavas la partoprenon de alloga internacia panelo de prelegantoj el Germanio, Kostariko, Japanio, Irano, Ukrainio, Francio, Italio, Hispanio kaj aliaj.

1.4 *Programo*

Mardo, 2023-10-10

09:00 Malfermo de la seminario

09:30 **Daniel Cascado Caballero**
Universitato de Seviljo (Hispanujo)
Etiko por artefarita intelekto

- 09:50 **David Gálvez Ruiz**
Universitato de Seviljo (Hispanujo)
Mitoj kaj realoj pri la artefarita intelekto kaj la maŝinlernado. Promenado en la eno de la besto
- 10:10 **Francesco Maurelli**
Konstruiva Universitato, Bremen (Germanujo)
La transforma potencialo de ChatGPT en edukado
- 10:30 Komuna diskuto
- 11:30 Libera tempo
- 14:00 **Renato Corsetti**
Universitato LA SAPIENZA, Romo (Italujo)
Reguligo de regula lingvo: uzo de la kaŝitaj reguloj de Esperanto fare de denaskaj esperantistoj
- 14:20 **Nina Danylyuk**
Lesja Ukrainka Volinia Nacia Universitato (Ukrainujo)
Tradukoj de la poemoj de Lesja Ukrainka hispane
- 14:40 **Philippe Planchon**
Universitato de Turo (Francujo)
Ĉu Esperanto emas spontane evolui, kvankam temas pri planlingvo?
- 15:00 Komuna diskuto
- 15:40 Informo
- Radojica Petrovic, gvidanto**
Partopreno en instrutreja seminario en Serbio, Aŭguston 2024, kun subteno el KA1 de Erasmus+
- 16:00 Pri Scienca revuo
- Francesco Maurelli, gvidanto**
Diskuto kaj proponoj rilate al la Scienca revuo, la scienca movado kaj la seminario
- 17:00 Komuna tempo kun kolegoj komencantoj
- 18:00 Fino de la marda programo
- Merkredo, 2023-10-11**
- 08:00 **KIMURA Goro Christoph**
Universitato Sofia, Tokio (Japanujo)
Esperanto inter internacia kaj minoritata lingvo: lingvosociologia aliro
- 08:20 **Duncan Charters**
Kolegio Principia, Ilinojso, (Usono)
Influo de sociaj retoj en lingvolernado kaj interkultura kompreniĝo
- 08:40 **Radojica Petrovic**
Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (Serbujo)
La esperantodaktika principo de interkultureco en virtualaj lernkomunumoj
- 09:00 Komuna diskuto

- 10:10 **Vicente Manzano-Arrondo, Viki**
Universitato de Seviljo (Hispanujo)
Sociaj retoj kaj homa konduto: Urĝa okupiĝo
- 10:30 **Zahra Karimi Moughari**
Universitato de Mazandarano, Babolsar (Irano)
Rolo de sociaj retoj en la iranana movado pri ŝanĝo de la politika kaj socia situacioj.
- 10:50 **María Luisa Soriano González**
Universitato Pablo de Olavide, Seviljo (Hispanujo)
Interreto kiel instrumento de lukto en la Zapatisma indiĝena movado
- 11:10 **Keyhan Sayadpour**
Universitato de Teherano (Irano)
Sociaj retoj en mia socio
- 11:30 Libera tempo
- 13:30 Komuna diskuto
- 14:30 **Bengt-Arne Wickström**
Universitato Andrássy, Budapesto (Hungarujo)
Lingvorajtoj kaj lingva justeco
- 14:50 **Jorge Antonio Leoni de León**
Universitato de Kostariko (Kostariko)
Lingvopolitiko je la horo de lingvomodeloj
- 15:10 Komuna diskuto
- 15:40 Libera tempo
- 16:00 Konkludoj kaj planado de projekto Erasmus Mundus
- 18:00 Fermo

2 INTERNATIONAL CONGRESS OF LINGUISTS 2024

2.1 Organizanto

Universitato Adam Mickiewicz, Poznano

2.2 Tempo

2024-09-08 – 2024-09-14

2.3 Priskribo

Oni klopodas organizi kadre de la kongreso laborsekcion pri interlingvistiko, ankaŭ por festi la 25-jaran tradicion de interlingvistiko ĉe la Universitato Adam Mickiewicz. Por helpi kaj

kontribui, bonvolu kontakti Ilona Koutny.

ilona.koutny@amu.edu.pl

3 PREZENTADO DE LA LIBRO «ÉPISTEMOLOGICAL AND THEORETICAL FOUNDATIONS IN LANGUAGE POLICY AND PLANNING»

3.1 *Tempo*

2023-10-03

3.2 *Loko*

En la reto:

<https://www.youtube.com/watch?v=CPAS7VrJIWg&t=1s>

3.3 *Priskribo*

Dr. Carla Amorós Negre, from the University of Salamanca, plays a pivotal role as the presenter for the recently released book titled “Epistemological and theoretical foundations in language policy and planning”, authored by Michele Gazzola (Ulster University), Federico Gobbo (University of Amsterdam), David Cassels Johnson, (University of Iowa) and Jorge Antonio Leoni de León (University of Costa Rica). This book “[r]e-establishes vital conceptual and methodological connections between policy analysis and Language policy and planning (LPP)”, and “[e]mphasizes contentious, formative, and groundbreaking contributions”. It “[c]ontemplates the future of agency and structure, the interplay between macro and micro aspects, and the positioning of researchers”. A significant portion of this book stems from the research project 745-C0713, conducted at the Institute of Linguistic Research (INIL) at the University of Costa Rica, underscoring its academic significance. During the book presentation, Dr. Carla Amorós Negre takes the lead, delivering an engaging talk that typically spans around thirty to forty minutes, although she may extend it if desired. This presentation serves as an insightful introduction to the book’s key concepts, themes, and contributions.

doi.org/10.1007/978-3-031-22315-0

4 UNUA STUDKUNVENO PRI «SETUEI» (ŜPAREMA UZO DE LA ANGLA LINGVO)

4.1 *Priskribo*

La 16an de septembro 2023 okazis en Sophia-Universitato, Tokio, la unua studkunveno pri «setuei» (ŝparema uzo de la angla lingvo) de la komuna esplorprojekto «Konstruo de nova paradigmo en interlingva komunikado: internacia komparo de «setuei»» (pri la projekto vidu IpI

n-ro 123, p.13). Post raportoj pri la pozicio de la angla en Francio, Germanio, Hispanio, Japanio kaj Tajvano kaj Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj prelegis prof. Florian Coulmas pri la demando, kio estas la plej bona skribsistemo de la mondo (The best writing system of the world).

Programo: <https://syakaigengo.wixsite.com/home/zk>

5 STUDRAPORTA KUNSIDO DE JAPANA ESPERANTO-INSTITUTO

5.1 Organizantoj

Japana Esperanto-Instituto kadre de la Japana Esperanto-Kongreso.

5.2 Loko

Kawasaki-shi Sogo Jichi Kaikan (Kawasaki, Japanujo)

5.3 Tempo

2023-10-21 – 2023-10-22

5.4 Programo (en la japana)

Sabato, 2023-10-11

14:15 **USUI Hiroyuki**
KITA Ikki kaj OSUGI Sakae en komparo el la vidpunktoj de Esperanto kaj Ĉinio
KIKUSIMA Kazuko (Krizantemo)
Postsignoj de la blinda «Translokiĝemulo» Eroŝenko

Dimanĉo, 2023-10-12

10:45 **SANO Hiroshi**
Kiel fari Esperanto-movadon kun altaĝuloj?
SESHIMO Masaya
Karakterizo de vortoderivado por nomoradiko en Esperanto

5.5 Fonto

<https://jek.jei.or.jp/>

II UNIVERSITATA KAJ ESPLORA AGADO

1 CONFERENCE: MAPPING MULTILINGUAL (COUNTER-)EXPERTISES: SCIENTIFIC AND POLITICAL KNOWLEDGE PRODUCTION ACROSS BORDERS IN THE LONG TWENTIETH CENTURY

Ĉe la Instituto pri transnacia kaj spaca historio de la Fakultato por historio, Universitato de St. Andrews, la 23-an ĝis 24-an de aŭgusto 2023 doktoroj Guilherme Fians kaj Bernhard Struck organizis seminarion pri multlingvismo en scienca kaj politika komunikado en la dudeka jarcento. Por la programo vidu:

<https://standrewstransnational.wp.st-andrews.ac.uk/files/2023/04/Mapping-multilingual-counter-expertises.-Conference-Programme-and-Book-of-Abstracts.pdf>

2 CORSO EN UNIVERSITATO DE SEVILJO

La Instituto por Eduk-sciencoj de la Universitato de Seviljo proponas kurson kun la titolo Esperanto kiel universitata ilo por instruistoj kaj esploristoj de la Universitato, tute senpagan kaj kun oficiala diplomo. La instruado okazas kunlabore kun Civiencia, entrepreno kun ampleksa sperto en la lingvo.

La 3-an de oktobro de 2023 komenciĝas en la Universitato de Seviljo kurso pri Esperanto por inesoĵ per la hispana. La kurso havas ĉefe du celojn. Unuflanke instrui pri la lingvo, la historio kaj la komunumo. Aliflanke rilatigi la lernantojn kun kolegoj el aliaj universitatoj de aliaj landoj, tiel ke fortiĝu la eblo resti en la movado post la kurso.

La sperto konsistas nur el 11 sesioj po 2 horoj, kiuj okazos ĉeeste kaj per zoom. La instruisto ne prezentas la lingvon, sed klarigas dubojn, aplikas konceptojn kaj praktikigas partoprenantojn pri komunikado. La rekta lernado okazas memstare hejme pere de la reta Kurso de Esperanto de la adreso <http://www.kurso.com.br/>. Tri sesioj estas iom apartaj. En la unua, la instruisto prezentas la kurson, la lingvon, la historion kaj la komunumon. En la dua, la lernantoj partoprenas la eventon «Internacia seminario pri sociaj retoj kaj homa konduto» (<https://kongreso.civiencia.io/SR2023/eo/>). Kaj la lasta miksas la finan ekzamenon kun internacia festo.

La universitato dekomence ne akceptis la kurson, ĉar nur ofertas lingvajn kursojn pri la angla. Estis bezonata trimonata diskuto ĝis atingi la jeson danke al la subskribo de interkonsento kun Civiencia, universitata entrepreno kun forta rilato kun Esperanto. Survoje aperis pli da malfacilaĵoj: (1) la universitato ofertas la kurson nur por siaj inesoĵ kaj postulas la aliĝon de ne malpli ol 30 kolegoj; (2) la oferto okazis antaŭ la somera ferio kaj la limdato aliĝi finiĝis tri semajnojn post la reveno; (3) la sistemo aranĝita por la aliĝo ne bone funkcias, avertante aliĝontojn pri malsekureco; kaj (4) oni ne disponigis manieron diskonigi la ekziston de la kurso en la inesaroj.

Do, kiel eblis sukcesigi ĝin? Unue laborigante la socian kapitalon de universitataj aktivuloj,

kiuj apogis la proponon pere de siaj propraj kanaloj en siaj fakultatoj kaj grupoj. Due, realigante strangan demandaron, kiu eniris en la sciencajn kanalojn kaj klopodis informi kaj scivolemigi. Kaj trie, zorgeme provante mesaĝojn, kies planita enhavo celis vekti (1) la liberecon, (2) la konscion pri la malekvilibro en la scienca konkurado kaj (3) la internaciajn ekmovadojn en scienco kaj universitato orientitaj al la ŝanĝo de la scienca hegemonio.

Malfermiĝis la eblo enskribiĝi en nova eldono de la kursoj de Esperanto organizitaj de la Ŝtata Universitato por Nacia Edukado de Hispanio (UNED), kun la kunlaboro de Hispana Esperanto-Federacio. Ni rememorigas ke ili estas instruataj rete, kun oficialaj instruistoj kaj konversad-helpantoj, kaj ili estas alireblaj ne nur el Hispanio, sed ankaŭ el multaj landoj el Eŭropo, Latinameriko kaj aliaj kontinentoj en kiuj UNED havas filiojn. Ĝi havigas oficialan diplomon de la Universitato, en du niveloj, A2 (baza en la kazo de Esperanto) kaj B1. Eblas enskribiĝi ĝis la 23-a de oktobro.

<http://www.cuid.uned.es>. Por pliaj informoj, bonvolu kontakti Viko, viko@civiencia.io

III KULTURO

1 LINGVOLERNADO ŜRUMPAS EN USONO

Kleruloj timas, ke la planoj de la Universitato de Okcidenta Virginio redukti la instruon de fremdaj lingvoj sekvigas similajn agojn aliloke en Usono.

Vidu:

https://www.chronicle.com/article/scholars-see-dangerous-precedent-in-west-virginia-u-s-plan-to-cut-foreign-languages?utm_source=Iterable&utm_medium=email&utm_campaign=campaign_7527977_nl_Academe-Today_date_20230821&cid=at&sra=true

2 INVITO AL TERMINARA REVIZIO

La Rekomendata Terminaro Esperanto-Angla kaj Angla-Esperanto por tradukantoj de oficialaj dokumentoj kaj gazetaraj komunikoj estis unue publikigita de UEA en 1976. Ĝin kompilis Victor Sadler kaj mi. Ĝia celo estis enkonduki iom da normeco kaj konsekvenceco en esperantigo de la tamen komplika terminaro pri UN kaj, pli ĝenerale, en tradukado de oficialaj dokumentoj en Esperanton.

Kvardek jarojn poste, en 2016, mi konstatis, ke iom post iom enŝteliĝis novaj variaj tradukoj por pluraj tiuj terminoj – foje akcepteblaj, foje ne. Mi do reredaktis la terminaron, samtempe elsarkante malaktualajn terminojn (precipe nomojn de instancoj kaj praktikoj ne plu ekzistantaj aŭ alinomitaj) kaj en pluraj okazoj farante ŝanĝojn por respondi al ŝanĝoj en lingvouzo en Esperanto.

Mi tion faris post interkonsiliĝo kun spertaj esperantistoj (inkluzive de Akademiaj kolegoj) kaj en kelkaj okazoj kun neesperantistaj oficistoj de UN.

En 2017 la eldonejo Mondial, en Novjorko, publikigis la novan eldonon, kaj ĝi aperis ankaŭ en la reto. Pasis pliaj ses-sep jaroj. Okazis kelkaj signifaj ŝanĝoj ĉe UN. Ankaŭ la agado de UEA ĉe UN intensiĝis. Aperis novaj neregistaraj organizoj, aŭ neregistaraj organizoj kun kiuj ni nove kunlaboris. La rolo de aliaj internaciaj organizoj intensiĝis, ekzemple la Eŭropa Unio. Kaj la tuta kampo de internacia kunlaboro, ekzemple rilate al daŭripoveco, enkondukis tutan amason da novaj terminoj.

Mi do decidis fari novan ĝisdatigon – ankaŭ por doni al la terminaro pli plenan atenton al Unesko kaj kelkaj aliaj UN-instancoj. Estus ja bele povi aldoni ankaŭ franclingvan version – ĉar UN kaj Unesko ja havas du sekretariatajn laborlingvojn. Sed tio estus tro granda laboro por la nuna momento: eble tiu projekto venos poste. Por ke la projekto de ĝisdatigo kaj ampleksigo bone iru, indas, ke pluraj spertaj homoj trarigardu la terminaron kaj donu siajn sugestojn pri aldonoj kaj ŝanĝoj (kaj eventuale korektoj). La terminaro ekzistas en presita formo (ĉe la eldonejo Mondial) kaj ĉe la retejo de Esperanto por UN:

<https://esperantoporun.org/eo/traduk-terminaro/>

<https://esperantoporun.org/en/translation-terms/>

Mi serĉas

1. kelkajn kompetentajn homojn pretajn iom sisteme trarigardi la tuton kaj doni sugestojn
2. homojn same kompetentajn kiuj pretas almenaŭ ĵeti al ĝi rigardon; se ili ŝatus labori pere de la presita libreto, mi pretas liveri ĝin al ili senpage kontraŭ la bezonata adreso

Laŭeble, mi ŝatus dediĉi la monatojn aŭgusto kaj septembro 2023 al kolekto de sugestoj (limdato do 30 septembro), oktobron kaj novembron al revizio, kaj decembron al pretigo de papera reeldono kaj de aperigo ankaŭ en la retejo.

Bonvolu kontakti min.

Humphrey Tonkin

tonkin@hartford.edu

3 ARTIKOLO KAJ PRELEGO PRI LA BICIKLA VOJAĜO DE LUCIEN PÉRAIRE

Artikolo en la monata revuo *L'Histoire*:

<https://www.lhistoire.fr/utopie-v%C3%A9lo-et-esp%C3%A9ranto>

pritraktas la biciklan vojaĝon de Lucien Péraire en 1928–1932 de Eŭropo al Indonezio per kaj por esperanto. La Centro Alexandre-Koyré - CAK (EHESS/CNRS/Muséum national d'Histoire naturelle en septembro 2023 organizis en Marseille prelegon kaj diskuton de Régis Fournier, ano de cifereca projekto «Péraire», Pascal Dubourg Glatigny, esplordirektoro ĉe CNRS, (Franca Nacia Esplorcentro) kaj Jade Nguyen, esploristo ĉe CNRS/Universitato de Aix Marseille, pri la Vjetnama parto de la vojaĝo de Péraire.

4 SGRAFITOJ

Temas pri originala filmo en Esperanto, kreita de Maximiliano Garcia kaj Alessandra Madella (MA-GA-Filmoj). Tra la tuta mondo sgrafitoj ofte ripetiĝas kaj estas reago al similaj problemoj, kio montras preskaŭ konscion serĉantan komunan lingvon por trovi esprimon. Ni utopie konkludas, montrante kiel komuna egaleca lingvo povus kune pensigi kaj realigi pli sencoplenajn formojn de vivo.

Fonto: MADELLA, Alessandra (2023). «Pri «Sgrafitoj» de MA-GA-Filmoj». En: *Internacia Pedagogia Revuo* **53(3)**:10-12.

<https://youtu.be/5vz8RxxgIgkQ?si=CawO0JXgcCg8KzMa>

IV PERSONOJ

V BIBLIOGRAFIAĴOJ

1 TEZOJ, DISERTACIOJ, DIPLOMLABORAĴOJ

TOTONI, Oltjana (2021). *Alienese translation: Anthony Burgess's Nadsat in a «Clockwork Orange»*, angla. Lancaster. Doktoreca disertacio. URL: [https://www.research.lancs.ac.uk/portal/en/publications/alienese-translation\(cb2644c3-8f8c-4a22-9010-2e2de4e53f18\).html](https://www.research.lancs.ac.uk/portal/en/publications/alienese-translation(cb2644c3-8f8c-4a22-9010-2e2de4e53f18).html).

La disertacio analizas la rolon de Nadsat en la romano de Burgess kaj hispanajn tradukojn de gxi, argumentante la neceson de tradukado, kiu kapablas respekti kaj konservi ties fremdecon.

Resumo

A Clockwork Orange (1962) by Anthony Burgess is a dystopian novel that «aspires to an imaginative visual futurism» (Morrison, 2000). Alex and his «droogs» speak Nadsat, an innovative constructed language and its «creation [...] is a novelistic triumph» (Coale, 1981). It is a teenage creole of the future that contains English, Russian and traces of Eastern and Western languages. This thesis reassesses how Nadsat functions in English and how Spanish translators have rendered Nadsat categories into NadSpanish. It investigates Nadsat linguistic and cultural features in the original text and compares them with *La naranja mecánica*, translated by Aníbal Leal in 1976 and Ana Quijada Vargas who translated Chapter Twenty-One in 1999. This translation is characterized by minor and major omissions that have affected the overall meaning and effect of Burgess's text. There are numerous factors that have led Leal to practice self-censorship while translating the text. They are significant because they have political, ethical, and aesthetical implications. As Antoine Berman and Lawrence Venuti suggest, there is a «necessity for reflection on the properly ethical aim of the translating act, receiving the Foreign as Foreign» (Berman and Venuti, *The Translation Studies Reader*, 2004). Chapter One analyses Nadsat categories including derivations, eponyms, portmanteau words, amputations, slang, infantilisms, and examines how Leal has rendered them into Spanish as well as what happens to the heterolingual elements that the author incorporates in his novel to give it an alienese dimension. Chapter Two explores different types of omissions in the target text, how they have contributed to the distortion of the source text and Burgess's dystopia by leaving many gaps behind, both linguistic and literary, cultural, and stylistic. Chapter Three compares Nadsat and Newspeak, the invented languages of Anthony Burgess and George Orwell, and how they have been translated into Spanish respectively by Aníbal Leal and Rafael Vázquez Zamora. It offers further insight into differences and similarities these conlangs have in their respective texts as well

as their own specificities in translation. The conclusion makes recommendations for other translations of *A Clockwork Orange*, guiding Spanish translators on how to translate Nadsat categories for a new set of readers while respecting the literariness, the foreignness and the alienese aspects of the text.

This thesis argues that Nadsat is alienese because it belongs to the category of invented languages where the language is not rendered directly, and it needs deciphering and decoding first. The Spanish translator therefore needs to «bend the language of the translation toward the original language» and «retain the feeling of foreignness» (Schleiermacher, 1992). This thesis conceptualizes an innovative form of translation, alienese translation, which is an umbrella term for translating conlangs that have similar features to Nadsat which is spoken by human aliens. The case made in this thesis for alienese translation is prepared by close textual analysis in Chapter One and Two, but it is mainly developed in Chapter Three through the comparison of Nadsat and Newspeak in the original and Spanish translation. While this comparative study of NadSpanish with Spanish Newspeak aims to contribute to our understanding of Nadsat in particular, and invented languages in general, it also aims to inform future translations of Burgess's and Orwell's novels, both into Spanish and in different languages.

2 LIBROJ

BICKNELL, Clarence (2021). *The book of guests in Esperanto: Transcription of Esperanto original and English translation*, tradukis Humphrey TONKIN. Bordighera: The Clarence Bicknell Fund, ISBN: 9798825934518. URL: <https://clarencebicknell.com/book-of-guests-in-esperanto/>.

Mallongaj biografioj aŭ notoj en esperanto de Clarence Bicknell pri geamikoj aŭ aliaj personoj kiuj dormis en Casa Fontanalba, sur la lando de Grafo Alberti della Briga de 1906 ĝis 1915, kaj kies komencaj nomliteroj estas pentritaj sur la muroj de la manĝoĉambro. Sur ĉiu makdekstra flanko troviĝas la notoj pri la gasto kun ties inicialoj kaj sur la dekstra flanko akvarelo de floro de la regiono.

GALASSO, Regina, redaktoro (2023). *This is a classic: Translators on making writers global*, angla. Literatures, cultures, translation. New York: Bloomsbury Academic. ISBN: 9781501376900. URL: <https://www.bloomsbury.com/us/this-is-a-classic-9781501376900/>.

Ĉapitro 5 de Humphrey Tonkin pritraktas esperanton:

La esperantista poeto Marjorie Boulton postlasis nefinitan tradukon de Koriolano de Shakespeare kiam ŝi mortis antaŭ kelkaj jaroj. Mi laboras pri ĝia kompletigo. Same kiel ŝia lastatempe eldonita traduko de Perlo, ĝi neeviteble levas la demandon pri kiel oni kreas klasikan tekston en lingvo, kiu estas multe pli juna ol la teksto mem - demando alfrontata diversmaniere de fakuloj en la tri ĉefaj lingvoj konkurantaj por monda supereco kiam Ludoviko Zamenhof (1859-1917) kreis Esperanton en 1887 – nome la germana, la franca kaj la angla. Goethe revis pri speco de universala literaturo derivita de la klasikaj lingvoj, Sainte-Beuve pri franca literaturo kiel rekta posteulo de la latina, Matthew Arnold pri literatura

tradicio devenanta de la grekoj. Zamenhof, dezirante doni al sia lingvo altan statuson kaj tre konscia pri la atingoj de la modernaj lingvoj sur ĉiuj kampoj, eklaboris super traduko de Hamleto en Esperanton, eldonante ĝin ene de kelkaj jaroj post eldono de la lingvo mem. Tiu forta deziro doni altan statuson al sia lingvo estas same videbla en la lingvo: Zamenhof formis Esperanton laŭ la latinidaj lingvoj, precipe la franca kaj, malantaŭ ĝi, la latina – sed kun iom da radikoj kaj sintaksaj konstruoj ĉerpitaj el la ĝermanaj lingvoj, kaj iuj elementoj el la slavaj. Li ankaŭ emfazis literaturan tradukadon kaj kreis la fundamenton por la forta literatura tradicio kiu karakterizas Esperanton de ĝiaj originoj en 1887 ĝis hodiaŭ – tradicio dependa kaj de originalaj kaj de tradukitaj modeloj.

GAZZOLA, Michele, François GRIN, Kathleen HEUGH kaj Linda CARDINAL, redaktoroj (2023). *The Routledge Handbook of Language Policy and Planning*, angla. Routledge handbooks in applied linguistics. Abingdon: Routledge. DOI: doi.org/10.4324/9780429448843.

Multaj ĉapitroj tuŝas interlingvistikajn temojn. Ĉapitro 37 de Sabine Fiedler pritraktas planlingvojn.

Enhavo:

Michele Gazzola, François Grin, Linda Cardinal, and Kathleen Heugh
Language policy and planning: from theory to practice

Foundations of LLP [sic!]

Leigh Oakes

The historical development of language policy and planning

John Edwards

Language policy and planning: terms of engagement

Torsten Templin and Bengt-Arne Wickström

Language competition models

The language policy cycle

THE EMERGENCE OF LANGUAGE-RELATED ISSUES

Rémi Léger

Language policy and planning and the role of the state

Peter A. Kraus

Language, belonging, and citizenship

Kathleen Heugh

Language policy, planning, and mobilisation in post-colonial civil societies

Virginie Mamadouh

Language and territory

Gilles Grenier and Weiguo Zhang

Languages, the labour market, and trade

Bengt-Arne Wickström and Michele Gazzola

The economics of language policy and planning

Mirta Vernice and Antonella Sorace

More than one language: cognitive perspectives and implications for language policy

THE POLITICS OF LANGUAGE AND AGENDA-SETTING

Selma K. Sonntag

Power and the politics of language

Jaffer Sheyholislami and Rachelle Vessey

Language policy and discourse in the public sphere: the discursive construction of language and multilingualism as policy objects

Guillaume Fürst

Inter-group relations and attitudes: conceptualisation, measurement, and relevance for language policy and planning

POLICY FORMULATION AND ADOPTION

François Grin

Language policy design and programme theory

Linda Cardinal

Language policy instruments

François Vaillancourt

Costs and benefits of language policy: how to measure them

Huw Lewis and Elin Royles

Governance, complexity, and multi-level language policy and planning

Roberta Medda-Windischer and Sergiu Constantin

Language rights and protection of linguistic minorities: international legal instruments, their development, and implementation

IMPLEMENTATION AND MONITORING

Helaina Gaspard

Principles for language policy implementation

Sebastian Godenhjelm

Language policy implementation from an interactive governance perspective

Michele Gazzola and Gabriele Iannàccaro

Indicators in language policy and planning

EVALUATION

Antonio Di Paolo

Quantitative methods in language policy and planning: statistical measurement and identification of causal patterns

Teresa L. McCarty and Kyle Halle-Erby

Qualitative methods in language policy and planning: ethnographic monitoring

Contexts of language policy and planning

Nenad Stojanović

Official multilingualism

Brian Ó Curnáin and Conchúr Ó Giollagáin

Minority language protection and promotion

Carlos Sánchez Avendaño

Reclaiming indigenous languages

Lisa J. McEntee-Atalians

International and supranational organisations

Ingrid Gogolin and Sarah McMonagle

Multilingual cities

Cinzia Colaiuda

Language education policies: the role of the Common European Framework of Reference for Languages

Joseph Lo Bianco

Language policy, literacy, and multilingualism

Maria Teresa Zanola

Language policy in higher education

Reine Meylaerts

Public services and translation policy

Tarlach McGonagle and Tom Moring

Language policy and regulation in the old and new media

Stefaan van der Jeught

Language policy and linguistic landscape

Timothy Reagan

Sign languages and language policy

Sabine Fiedler

Planned languages

H. Ekkehard Wolff

Transnational agencies and national language policy and planning in multilingual Africa

Katalin Buzási

Language policies and integration in the labour market and society in Europe

KOUTNY, Ilona, redaktoro (2023). *Komunikado kaj esperanto*, Interlingvistikaj studoj 3. Poznań: Wydawnictwo Rys. DOI: doi.org/10.48226/978-83-67287-90-6.

Enhavo:

Antaŭparolo

Ilona Koutny

Enkonduko al komunikado

Komunikado el diversaj aspektoj

Humphrey Tonkin

Lingvo kaj socio

Vicente Manzano-Arrondo

Psikologio de komunikado

Bengt-Arne Wickström

Lingvo kaj ekonomiko

Marc Bavant

Specifeco de reta komunikado kaj ĝentileco en ĝi

Milan Kolka

Reta komunikado

Arya Bhaskara Ferduz

Memeo kaj Esperanta Komunikado

Rafał Darasz

Signolingvoj en la kunteksto de loka kaj internacia komunikado

Maurizio «Rico» Giacometto

Komunik-sistemoj ĉe katoj: kiel katoj komunikiĝas kaj kial ili miaŭas?

Internacia komunikado

Humphrey Tonkin

Komunikaj rajtoj

Humphrey Tonkin

Inkludo kaj ekskludo en la lingvopolitiko

Detlev Blanke

Esperanto, la esperanta lingvokomunumo kaj lingvopolitiko

Fabio Fortes

La kontribuo de Esperanto al la debato pri komunikado en multlingva mond-ordo

Michael Farris

La internacia angla: demandoj pri egaleco kaj normoj

Interkultura komunikado

Ilona Koutny

Interkultura komunikado kaj Esperanto

Gong Xiaofeng

Komparoj en la parola kaj korpolingva komunikado inter ĉinoj kaj eŭropanoj

Ilona Koutny

Ĝentileco en internacia kunteksto per la uzo de Esperanto

MADELLA, Alessandra (2023a). *Esperanto: facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj*, Pisa: Edistudio. ISBN: 978-88-7036-095-0.

Ĉi tiu volumo kolektas la jam jarcent-longan historion de eksperimentoj pri la lerneja instruado de esperanto en diversaj partoj de la mondo. Ili montras, ke la internacia lingvo ne nur estas facile lernebla, sed ĝi ankaŭ faciligas la lernadon de aliaj lingvoj, inkluzive de la denaska, kaj helpas en la kazo de specifaj lernomalordoj.

- (2023b). *L'esperanto: facilità di apprendimento e aiuto nello studio di altre lingue*, itala. Pisa: Edistudio. ISBN: 978-88-7036-818-0.

Itala versio de:

MADELLA, Alessandra (2023). *Esperanto: facile lernebla kaj helpo en la studo de aliaj lingvoj*, Pisa: Edistudio. ISBN: 978-88-7036-095-0.

MCENTEE-ATALIANIS, Lisa J. kaj Humphrey TONKIN, redaktoroj (2023). *Language and sustainable development*, angla. Language policy 32. Heidelberg: Springer Cham. DOI: doi.org/10.1007/978-3-031-24918-1.

Enhavo:

Humphrey Tonkin

Introduction: diversity of language, unity of purpose

Mark Fettes

Language and the sustainable development goals: Challenges to language policy and planning

Lisa J. McEntee-Atalianis

Language, digital resources and the sustainable development goals

Francis M. Hult

Sustainable multilingual education

Christine Hélot

The sustainability of multilingualism from home to pre-school contexts: Three case studies from Europe

Colleen du Plessis, Theo du Plessis

Realising inclusive and equitable quality education in South Africa: Achievements and obstacles on the language in education front

Rosemary Salomone

In pursuit of sustainable educational development: The Philippines and the English dilemma

Kurt E. Müller

Primary and secondary language use in peacekeeping and stabilization operations: A preliminary to sustainability

François Grin

The connections between sociolinguistics and economics, and their implications for sustainability

SHAKESPEARE, William (2023). *Koriolano*, tradukis de la angla Marjorie BOULTON kaj Humphrey TONKIN. Enkonduko kaj komentarioj de Humphrey TONKIN. Barlastono: Esperanto-Asocio de Britio. ISBN: 978-0902756694. [Originale eldonita kiel: *Coriolanus*.]

3 LIBROĈAPITROJ

FIEDLER, Sabine (2024). «Planned languages», angla. En: *The Routledge handbook of language policy and planning*. Redaktis Michele GAZZOLA, François GRIN, Linda CARDINAL kaj Kathleen HEUGH. Routledge handbooks in applied linguistics. Abingdon: Routledge. Ĉapitro 37: 548–561. DOI: doi.org/10.4324/9780429448843.

Vidu ankaŭ la sekcion «Libroj».

4 NOVAĴLETEROJ

4.1 *Global coalition for language rights (GCLR)*

Aŭgusto 2023:

Septembro 2023:

<https://us5.campaign-archive.com/?u=b62120d2e1b6176cff54b89ba&id=1e298cf41e>

IpI estas eldonaĵo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri Mondaj Lingvaj Problemoj (CED) ĉe Universala Esperanto-Asocio (UEA), Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. ISSN 1385-2191.

Por ricevi informon pri estontaj numeroj, aŭ por sendi eldonotajn informojn, retmesaĝu al ipi@esperantic.org. Limdatoj por numero de sekva monato estas: 28-a de februaro, 31-a de majo, 30-a de aŭgusto kaj 30-a de novembro. Kontribuaĵoj el ĉiuj mondaj regionoj estas bonvenaj. Ni akceptas materialon en Esperanto aŭ en alia lingvo.

Estraro de CED

**Mark FETTES (direktoro) ♦ Guilherme FIANS ♦ Snehaja VENKATESH
Klaus SCHUBERT ♦ Humphrey TONKIN ♦ Michele GAZZOLA.**